

EŬROPA BULTENO

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri EŬropa Unuiŝo

n-ro 12

10-an de marto 2001

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de EŬropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@tiscalinet.it

-u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@wx.nl

UEA-konto de EEU: eece-p

Tiu ĉi rebulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *EŬropa Esperanto-Unio (EEU-informilo)* kaj pri la eŬropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŬropa unuiŝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**EŬropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@tiscalinet.it*, same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento



Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 € jare al la UEA-konto **eece-p**

TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

EEU - INFORMILO

EŬROPATAGODUMLAITALA ESPERANTO-KONGRESO EN TRIESTO

Okaze de la 70a Itala Esperanto-Kongreso en Triesto (28a de julio - 1a de aŭgusto 2001) la tago de lundo 30a de julio estos dediĉita al eŬropaj temoj.

por informoj: <http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html>

aŭ <http://members.xoom.it/verdastelo/>

DETLEV BLANKE

RAPORTO PRI LA KONFERENCO

“PLURLINGVISMO KAJ NOV TIPAJ LERNMEDIOJ” EN BERLINO

Detlev Blanke

Otto-Nagel-Str. 110

D-12683-Berlin

Tel. +49-30-54 12 633 Fax +49-30-54 56 742

Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)

<http://user.berlin.de/~gil.berlin>

blanke.gil@snafu.de

28.-30.6.01, Freie Universität (Libera Universitato) Berlin

1. UEA membras en la «EŬropa Konsilio por Lingvoj» (European Language Council. Conseil Européen pour les Langues). EKL estas sendependa organizaĵo, malferma al ĉiuj universitataj lingvaj instruejoj kaj institucioj kaj fondiĝis en 1997. Ĝi kaj havas kiel ĉefan celon la kvantan kaj kvalitan plibonigon de konj pri

eŭropaj lingvaj kaj kulturoj.

2. De 28-a ĝis 30-a de junio 2001 en Berlino, en la ejoj de Freie Universität (Libera Universitato) kun subteno de EU EKL okazigis konferencon lige al la « Eŭropa Jaro de la lingvoj 2001 » sub la kadra temo « Plurlingvismo kaj novtipaj lernmedioj ».

Ĝi-tiu aranĝo estis deklarita « la plej grava universitatmedia aranĝo » kadre de la eŭropa jaro de la lingvoj. Partoprenis ĉ. 400 delegitoj de entute 189 universitatoj, alitipaj altlernejoj, ministerioj, ambasadejoj, naciaj lingvo-institucioj eksteren direktitaj, eŭropunaj instancoj ktp. Apenaŭ reprezentivis internaciaj neregistaraj organizaĵoj, do UEA estis ekzotika.

La delegitoj venis el 37 landoj.

3. UEA estis reprezentita de Detlev Blanke kaj listigita en la listo de la partopreantoj inter Technische Universität Dresden kaj Universität Bayreuth (sub Germanio). Mi certas, ke la organizantoj apenaŭ sciis orientiĝi pri tiu ekzotika.

4. La konferenco realiĝis en plenkunsidoj kaj laborgrupoj. Temas pri jenaj laborgrupoj:

- a) La universitatoj kaj la lingvopolitiko de Eŭropo
- b) Memstara lingvo-lernado
- c) La programo DIALANG: testi lingvo-konojn en la Interreto
- d) Kunlaboro kaj la komuna uzado de esplorfontoj

Mi vizitis la laborgrupon a)

5. Pri la organiza kadro: La germana, angla kaj la franca estis la lingvoj de interpretado (KEL oficiale estas dulingva, uzas nur la anglan kaj la francan).

Nek post la ĉefaj prelegoj en la plenkunsidoj nek en la laborgrupoj eblis iu ajn diskuto. Ĝio estis preparita. Unu prelego sekvis la alian.

Pro tio la reprezentanto de UEA havis nenium ŝancon por interveni.

6. La ĝeneralaj rezultoj, la ĉefaj mesaĝoj de la konferenco, estis:

- Ĝefa demando: Kiel konservi la multlingvismon (plurlingvismon) kaj samtempe plifaciligi la komunikadon?
- Multlingveco estas komprenata jene: la angla estas la nediskutebla lingva franca, post tio ĉiu eŭropano regu 1-2 pluajn fremdlingvojn laŭ la formulo 1+>2 (gepatra lingvo + la angla + plus almenaŭ unu alia fremdlingvo, eventuale la najbara ktp.)
- Necesas pli frue al pli da homoj instrui pli efike pli da lingvoj, krom la angla, kiu estas komprenebla.
- La negativaj sekvoj de la hegemonia rolo de la angla apenaŭ estis tuŝitaj. Ŝajne regis interkonsento, ke la angla estas la mondlingvo. Fino.

Tamen

- Germanoj (strange, ke ne francoj kaj aliaj), sekvante sian aktualan oficialan politikon, plendis, ke la germana ne ludas la adekvatan rolon en EU. Oni parolis foje pri “lingva kverelo” en Bruselo, menciis la konflikton kun la germanoj, kiam la prezidanteco de EU havis Finnlando kaj Svedio.

Ankaŭ estis germano (reprezentanto de Germana Akademia Interŝanĝo-Servo [Deutscher Akademischer Austauschdienst, DAAD], d-ro Bode) kiu postulis “forpreni la anglan de la anglalingvaj landoj” kaj plisimpligi ĝin por la rolo de lingva franca, kiu ne devas esti ligita al specifa kulturo (liaj kelkaj rimarkoj iris en la direkton de Basic English, sen menciigi ĝin).

Oni plendis, ke la batalo kontraŭ Franglais kaj Denglish eble komenciĝis tro malfrue.

La germana ambasadoro en Britio (d-ro Hans-Friedrich von Ploetz pri “Multlingva Eŭropo - iluzio aŭ ŝanco por la estonteco?”) unuflanke neniel dubindigis la rolon de la angla kaj aliflanke sufiĉe draste postulis samrajtecon de ĉiuj lingvoj en EU kiel oficialaj kaj labolingvoj, krome atentigis pri la graveco de Germanio ktp. kaj prognozis “se la eŭropanoj ekhavos la impreson pri angligo, francigo aŭ germanigo de Eŭropo pere de la lingvoj, ili tiam ne akceptos kaj konfliktoj estos antaŭvideblaj”.

7. La partopreno de UEA-delegito havis jenajn pozitivajn:

- Eblis sekvi sur alta nivelo la aktualan diskuton en universitataj kaj sciencpolitikaj medioj pri lingvopolitikaj problemoj de EU kaj defioj, konsciataj aŭ ignorataj.
- Eblis observi, ke almenaŭ en tiu akademia medio malfortas la konscio pri la politikaj dimensioj de la eŭropunia lingvo-problemo,
- UEA estas ligita kiel "normala" partnero al KEL, ricevas la koncernajn materialojn kaj invitojn al konferencoj, kio en si mem estas grava.

Berlin, 6.7.01

Jen neformala komento de prof. Detlev Blanke:

<<Tiu organizaĵo eĉ ne havas lingvopolitikan konscion, ne parolante pri intereso, kiun ŝi devus havi por ĉiuj EU-lingvoj. Oni tradukis nur en la anglan kaj francan, kvankam abundis hispanoj, italoj ktp.

Oni neniam serioze menciis iujn malgrandajn EU-lingvojn, nur la anglan, francan kaj (flanke de la germanoj) la germanan.

Ĝiu alia esprimo („ĉiuj lingvoj estas samrajtaj“ ktp.) estis pura retorikaĵo.>>

* * * * *

E Ŭ R O P A D E B A T O

Andrea CHITI-BATELLI

ĜU EBLAS RIMEDO KONTRAŬ LA LINGVOVOREMO DE LA ANGLA LINGVO?

(Jen estas sintezo, en dek punktoj, de la prelego, kiun la aŭtoro prezentos al la itala E-kongreso en Triesto la 29an de julio 2001.)

1. - En Eŭropo kie, ankoraŭ nun, estas pli alta ol oni opinias la nombro de la analfabetoj aŭ duon-analfabetoj (tion memorigis antaŭ nelonge Tullio De Mauro koncerne al Italio), estas absurde proponi amasan plurlingvecon, kiu estas rekomendenda nur al la elitoj. Ne igas similan politikon malpli absurda la fakto ke ŝi estas alproprigita al si de Eŭropa Unio, same kiel de la Konsilio de Eŭropo.

Des pli tio veras, tial ke la neceseco de ununura eŭropa kaj tutmonda komunika lingvo estas trudita de la faktoj, ĉar la ununureco de tia lingvo estas nepre bezonata por realigi per la minimuma peno la internacian komunikadon je ĉiuj niveloj, ekde scienco ŝis ekonomiko, ekde diplomatio ŝis turismo.

2. - Tia lingvo, je la nuna stato povas nur esti la angla, ĉar estas bronza leŝo de socilingvistiko ke la komunika lingvo (lingua franca) - la babilona, la greka, la latina, la franca, laŭ la tempoj - estas ĉiam tiu de la potenco ekonomie, science, militiste dominanta.

3. - La sama socilingvistiko montras tamen ke hegemonia lingvo de hegemonia potenco ĉiam havis efikon ŝisradike detruan al la dominataj lingvoj. Kiu do subtenas aŭ akceptas la anglan, aŭ simple rezignacias je ŝi, tiu ankaŭ devas rezignacii vidi la ceterajn lingvojn, eĉ la plej gravajn, reduktiŝi - en la tempodaŭro maksimume de unu jarcento - al la rango de dialektoj, antaŭĉambro de estingiŝo, kiel pli kaj pli multaj lingvistoj kaj kleruloj agnoskas. (Kaj male ĉiuj pledantoj por la angla, kaj aparte la lingvodidaktikistoj, silentas - hipokrite kaj kulpe - pri tiu ĉi teruriga "alia flanko de la medalo").

4. - Kiu, same kiel mi, ne rezignacias, tiuj trovas elirvojon en la ekzemplo de la latina lingvo. Estas vere ke ŝi estis sovaŝe lingvovora kaj detruis ŝisradike en la antikva Eŭropo la lingvojn de la popoloj kaj teritorioj, sur kiuj etendiŝis la romia Imperio, komence de tiu de miaj praaĵoj, la Etruskoj. Sed, post kiam la lingvo de Romo ĉsis esti lingvo de Imperio kaj - eble eĉ pli grave - ŝi ne plu estis denaska lingvo de iu popolo, tiam ŝi povis resti dum multaj jarcentoj lingvo de la kulturo, de la scienco, de la Eklezio, sen pro tio malhelpi le disvolviŝon de la populaj latinidaj lingvoj kaj de la aliaj lingvoj de la Malnova Kontinento: ŝia lingvovora efiko estis, en la Mezepoko, tute ĉsinta.

5. - De ĉi tie jen mia konkludo (kaj ne nur mia): nur lingvo kiu por neniu estu denaska povos esti "lingua franca" eŭropa kaj tutmonda sen minaci je detruo la ceterajn lingvojn, male eĉ respektante kaj protektante ties konservadon. Jen alia veraĵo intence ignorata, pri kiu estas necese insisti.

6. - La *ius citata leŭo de la socilingvistiko* igas tamen, je la momento, tute abstrakta kaj utopia la elekton de lingvo planita kaj neŭtrala por tia rolo de helpa lingvo, unue de Eŭropo kaj poste de la mondo. Estas vere ke Esperanto estas jam uzopreta kaj ke pli ol centjara sperto pruvis ties praktikecon kaj facilecon (krom ŝia kapablo esti prepara ilo por pli rapida kaj pli bona ellernado de etnaj lingvoj). Estas vere ke ŝi, pro sia racieco, lerneblas pli rapide kaj pli komplete ol la etnaj lingvoj. Estas vere ke ŝi metas aŭjn sur egalecan nivelon kaj ne estigas popolojn "pli kaj malpli egalajn ol la aliaj". Sed al Esperanto mankas nunmomente - kaj tio estas la afero esenca - la politika forto, la propulsilo kapabla "enorbitigi ŝin".

7. - Tamen la rimedo - la "deus ex machina" - por eliri el situacio ĵajne senespera povas konsisti - eĉ se tio estas tute necerta - en la Eŭropa Unio, se ŝi kapablos transformiŝi, kiel deziras la federistoj, al vera ĵtato federacia. Tiam ŝi bezonos en sia interno oficialan federacian lingvon, kiu privilegiu nenium el la membroj, kaj sentos la nepran bezonon, enkaŭ eksteren, kontraŭstari la hegemonion de la angla, kiu ne estas nur lingva hegemonio, sed fatale estigas ankaŭ efikon de politika dominado.

8. - Tio aŝi do estas la strategio kiu ĵajnas al mi sugestinda. Akcepti por la momento - "dura lex, sed lex" - la anglan, kiu nun kaj aŝi tie ne havas alternativojn, aŝe la nuntempa ekvilibro, aŝy pli ŝuste malekvilibro de internacia potenco. Sed batali, samtempe, sur duobla fronto, tio estas:

- denunciado pri la gravegaj riskoj devenantaj de tia situacio, je mezlonga tempolimo, ne nur por la lingvoj, sed ankaŭ por la kulturoj de la eŭropaj popoloj, kiuj, senigite je la idiomoj ilin esprimantaj, estos pli kaj pli neniigataj en malriĉan universalan anglalingvecon;

- kaj engaŝiŝo, decida kaj konvinkita, celanta eviti tiun duoblan riskon, por la realigo de Eŭropa Federacio, aktive kunlaborante kun la movadoj tiucelaj; nur tiu Federacio povos doni aktualecon al la Esperanta alternativo, kiel unua paŝo por poste plivastigi ŝin je tutplaneda nivelo.

9. - Restas la grava danĝero konsistigita de la fakto ke la progresoj de la angla estas pli kaj pli rapidaj. Sufiaŭ memori ke la plej multaj el la eŭropaj sciencaj revuoj jam publikiŝas anglalingve, ke oni konsilas al la studentoj anglalingve verki siajn disertaciojn, ke oni komencas anglalingve fari universitatajn lekcionojn, kiel en la Bocconi-Universitato de Milano, (kaj aliflanke ke oni instruos la anglan jam ekde la elementaj lernejoj). Tio estas, aŝy almenaŭ tio povas esti, la komenciŝo de la fino.

La tempo premas, do, kaj baldaŭ estos atingita la "punkto de ne-reveno": la kostoj de rekonverto al planlingvo montriŝos, je iu punkto, tro altaj, kaj la rekonverto mem estos juŝata kiel nerealigebla, kia ajn estus ŝia kosto. De tio la neceso engaŝi sin tuj, kaj energie, en tiu aŝi batalo, aŝiam emfazante en kio konsistas la vetaŝo: nome la pluvivado, aŝy la detruiciŝo, de la "eŭropa identeco", kiu tute konsistas, kaj resumiŝas, en la plureco de ŝiaj lingvoj kaj kulturoj. Ni fortunu, dum ni ankoraŭ ne tro malfruas, tiun aŝi ekologian katastrofon lingvan, kiu nin minacas pli kaj pli proksime; la minaco ne malpli gravas ol tiu konsistigata de la vivmedia ekologia katastrofo, sed pri la lingva katastrofo ŝis nun oni eĉ malpli ekkonsciis.

10. - Por la esperantistoj estas aparte malfacile akcepti tion, kion ni proponas, tial ke ŝi implicas "deŝirantan revizion" de la koncepto karakterizanta ilian movadon ekde ŝia naskiŝo. Ŝi implicas, por uzi espimon de Kant, kopernikan revolucion, aŝy, por uzi marksan esprimon, transiron de la "utopia esperantismo" al la "scienca esperantismo".

Tio signifas ke la nepra antaŭkondiĉo por esperanto, la sola kapabla "enorbitigi ŝin", ne sidas, kiel la esperantistoj kredas, en la kvalitoj de tiu aŝi lingvo, sed en apogo fare de politika potenco, pri kiu ŝi povos - aŝy ne povos - kalkuli. Ŝia racieco, ŝia facileco, ŝia taŭgeco al la rolo de helplingvo ne havas - sen tiu apogo - iun ajn antaŭenigan efikon; tio klarigas la ŝisnunan nesukceson de tiu lingvo.

Do estas necese engaŝi sin tuj, antaŭ ol estos tro malfrue. Tia engaŝiŝo devus interesi la esperantistojn de aŝuj kontinentoj, aŝar la venko hodiaŭa de Esperanto en la Eŭropa Unio estos la nepre necesa premiso por la venko morgaŭa de Esperanto en la tuta mondo.